

ESPERANTO: LA CITRONO ESTAS ELPREMITA

Tutmonda cignokanto de la Esperanto-movado depost 1987

20 objektivaj kialoj, konstatoj kaj konkludoj pri la krizo kaj definitiva fiasko de Esperanto, 1887-2017, el nuntempa perspektivo

Post profunda kaj konkreta analizado de la aktuala situacio de la lingvo kaj movado Esperanto la aŭtoro venis al jenaj konkludaj konsideroj, kiujn li opinias ĉefrespondecaj aŭ ĉefkulpaj pri la aktuala krizo (aŭ malvenko) de Esperanto kaj de la Esperanto-movado:

1. Preskaŭ kompleta signifoperdo de Esperanto en la mondo.

Post 1987, la jaro de sia kulmino kaj samtempa komenco de sia cigna kanto,¹ Esperanto travivis preskaŭ totalajn signifoperdon kaj idean malaktualiĝon en la mondo, ĉar la homaro preskaŭ komplete rezignis pri la ideo de neŭtrala lingvo, interna ideo, homaranismo, ktp. Do, plej malfrue en la jaro de la centa datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (2017) oni povas konsideri Esperanton fiaskinta kaj la mision de la Esperanto-movado neplenumita. Ĉar ĉiuj espero, anoncoj, antaŭdiroj kaj promesoj de la esperantistoj pri „fina venko de Esperanto“, „nova kulturo“, „nova mondordo“ „solvo de la monda lingva problemo“ per Esperanto ktp. laŭ la imagoj de la esperantistoj elvaporigis kaj perdis sian sencon, ĉar ili perdis sian bazon; fakte temis pri nuraj propagandaj blufoj, naivaj fantazioj kaj ideologiaj iluzioj, varma aero, krevontaj kaj krevintaj balonoj.

2. Degenerado kaj ŝrumpado de la Esperanto-movado al kelkmil membroj.

Intertempe, la Esperanto-movado ŝrumpis al movadeto kun kelkdek, maksimume kelkcent centraj aktivuloj, kaj kelkmil asociaj membroj (plej ofte pasivaj kaj paperaj aŭ fikciaj statistoj), anonimaj kotizpagantoj kaj nekonataj kongresanoj, kiuj verdire flegas aŭ sian amatan hobion, turismas, aŭ amatore okupiĝas pri asocia laboro. La movada kerno esence konsistas el enfermita cirklo, formanta inter si solidaran koterian amikaron, kiu reprezentas ankaŭ la aparaton de asociaj funkciuloj, kiuj okupas kaj kontrolas ĉiujn gravajn movadajn postenojn kaj oficojn kaj sidas parte samtempe en ĉiuj eblaj estraroj, komitatoj kaj redakcioj.² Do, pri Esperanto interesiĝas esence ankoraŭ ĝiaj eternaj aktivuloj, krome turistoj kaj scivolemuloj (ĉefe tra la interreto) plus kelkaj sciencistoj kaj politikistoj (precipe el la maldekstra tendaro), sume do kelkcent, maksimume kelkmil personoj tutmonde.³ La erozio de la asociaj

¹ En tiu jaro okazis la 72a Universala Kongreso de Esperanto de Varsovio kun 6000 aliĝintaj partoprenantoj. Poste tia nombro neniam plu povis estis atingita de iu Esperanto-kongreso (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Kongreso_de_Esperanto). Meze de la 80aj jaroj la membronombroj de UEA komencis draste faladi (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Membronombroj_de_UEA).

² Tipaj ekzemploj de tiu tipo de grupiĝoj estas ekzemple: <http://www.uea.org/asocio>, http://akademio.esperanto.cc/index.php?title=Membroj_kaj_korespondantoj, <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/ueber-uns/vorstand.php>, <http://www.esperantic.org/en/about-us/directors> kaj <http://www.esperantic.org/en/about-us/advisors>, <https://benjamins.com/#catalog/journals/lplp/main>, <http://www.europo.eu/eo/estraro>, <http://svisa-esperanto-societo.ch/adres.html>, <http://sezonoj.ru/2017/03/uam-14>. Koterio de aparta speco estas <http://esperantio.net>, kiu difinas sin kiel UEA-opozicion kaj per sia skurila kurso kondukis parton de la Eo-movado al la absurdo.

³ Ĉiuj ĝis nun prezentitaj kalkuloj kaj asertoj pri nombroj de Eo-parolantoj estis arbitraj, puraj fantazioj kaj fikcioj kaj nesciencaj. La sola serioza kaj realisma bazo por proksimume taksi aŭ kalkuli la parolantojn de Esperanto (aŭ esperantistojn) prezentas la listoj de Eo-organizaĵoj kun membroj kaj aktivuloj. Kiel ĉefa fonto povas servi la Jarlibro de UEA, kiu kunigas ĉirkaŭ 20'000 membrojn (kiel mi proksimume kalkulis antaŭ kelkaj jaroj); tiu cifero inkluzivas, krom la delegitoj, ĉiujn individuajn kaj kolektivajn asociajn membrarojn de Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (kies nomoj ne aperas en la Jarlibro kaj estas verŝajne konataj nur al la koncernaj asocioj mem; Laŭ tiu ĉi kalkulo <http://www.planlingvoj.ch/>

membraroj progresas rapide: La membronombro de UEA draste falis en 2016,⁴ kaj la membronombroj de aliaj Esperanto-asocioj, plej ofte nur kelkdek aŭ kelkcent, estas ignorindaj.⁵ Multaj iamaj lokaj Esperanto-grupoj malaperis (ĉar en ili restis praktike nur kelkaj maljunuloj) kaj pluraj Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA ekzistas nur sur la papero. Do, temas pri elmortantaj asociaj strukturoj, kiuj estas verŝajne sen reala perspektivo por restarigi aŭ revivigi ilin (krom se Esperanto reaktualiĝus). La bilanco post 130 jaroj de Esperanto do estas mizera, fakte katastrofa. Esperanto apenaŭ plu ekzistas en la publika konscio de la homaro, kaj la junaj generacioj ne plu scias kio estas Esperanto kaj ne serioze interesiĝas pri ĝi.

3. Politika diskreditiĝo de la Esperanto-movado en Orienta Eŭropo.

Esperanto kaj la Esperanto-movado estis ligitaj precipe kun la vivo kaj agado de L.L. Zamenhof (1859/87-1917) kaj la internacia pacifismo ĝis kaj iom post la Unua Mondmilito kaj ludis ian (dubindan) politikan kaj socian rolon en la „socialismaj“ landoj de la Orienta Bloko dum la Malvarma Milito, kie la esperantistoj devis apogi la komunismajn reĝimojn, se ili volis konservi sian movadon. En la postmilitaj „socialismaj“ landoj Esperanto kaj la Esperanto-movado estis krude uzurpataj kaj misuzataj de la komunistoj por celoj de la ŝtata propagando, kio ne ekskludis la politikan misfamigon de la nesocialismaj landoj (precipe en GDR).⁶ La esperantistoj en tiuj landoj havis neniun alian elekteblon ol kunludi tiun malpuran politikan ludon de la komunistoj, kion ili faris, kvankam sub politika premo, pli malpli libervole kaj parte kun granda entuziasmo (kiu eble estis artefarita), ĉar ili aranĝis sin kun la komunisma reĝimo en tiuj landoj, kies komplikoj kaj ostaĝoj ili vole-ne-vole fariĝis. Hodiaŭ voli senkulpiĝi sin per la klarigo, ke la esperantistoj estis devigitaj de la regantaj politikaj cirkonstancoj politike tiel agi kaj konduki kaj ke ili mem fariĝis viktimo de la tiama monda politiko, estus tro simple kaj malhoneste. Ĉe ĉiuj „socialismaj“ landoj temis pri totalismaj, fakte krimaj ŝtatoj „sen objektiva juro“

UEA delegitoj kaj membroj.pdf en 2015 UEA havis (laŭ mia kalkulo) 1204 delegitojn, 15'867 asociajn kaj 4914 individuajn membrojn kaj 2819 junajn membrojn. Oni povas dubi, ke ekster tiuj oficialaj membraroj ekzistas ankoraŭ konsiderinde pli granda nombro de esperantistoj aŭ Eo-parolantoj. Kiom da homoj scipovas, konas aŭ lernas Esperanton ekster la kadro de la UEA-movado, ekzemple en interreto, ne estas konate (aliĝintoj al la movado el tiu kanalo estas konataj ĝis nun nur malmultaj), ĉar la virtuala realeco (t.e. la statistikoj) de la interreto estas dubinda kaj funkcias laŭ alia kalkulo kaj logiko, kiu ne estas komparebla kun la logiko de la 'fizika realeco'. Aliaj fontoj por taksii la nombron de interesiĝantoj, lernantoj kaj praktikantoj estas ekzemple lingvokursoj (ekzemple universitato de Poznań, ekzamenoj de K. Kováts) aŭ partoprenantoj en kvante iom konsiderindaj kongresoj (UK/IJK, landaj kongresoj, slovaka SES, lingvaj festivaloj en Rusio, k.s.). Sed ĉu en tiuj kazoj temas pri konstantaj kaj longtempaj praktikantoj de Eo, estas malklare (necesus fari komparan analizon aŭ statistikon de la listoj de partoprenantoj). Ĉiukaze, la nombro de la publiko, kiu partoprenas en tiuj sferoj de la movado, estas relative malgranda (inter kelkdek kaj kelkcent homoj). Sed eble tio ja ne estas la tuta vero pri nombro de Eo-parolantoj. Alia demando koncernas la kvalitan konon de la lingvo. De aktivaj Eo-parolantoj nur relative malgranda procentaĵo perfekte (aŭ almenaŭ bonege) parolas tiun ĉi lingvon kaj estas kleraj e-istoj. Krom tio ekzistas granda diferenco inter la nombro de aktivaj e-istoj, kiuj perfekte parolas Eon, kaj la nombro de personoj, kiuj apogas Esperanton aŭ ĝian ideon kaj estas pasivaj membroj de Eo-asocioj.

⁴ Intertempe, la membronombroj de UEA draste ŝrumpis. La plej aktuale publikigitaj oficialaj ciferoj de UEA (en *Esperanto*, aprilo 2017) estas: 5501 individuaj kaj entute 14'716 membroj en 2015 kaj 4365/13'054 en 2016 (pro la kotizpagantoj la cifero estas iomete pli alta). Sume, UEA havis en 2016 1662 membrojn malpli ol en la antaŭa jaro (kaj 161 junajn membrojn malpli). Laŭ mia rekalkulo (nur laŭ landoj) estis en la jaro 2016 12'652 asociaj kaj 4084 individuaj membroj (vd.

http://www.planlingvoj.ch/UEA_delegitoj_kaj_membroj.pdf). Laŭ tiu nova kalkulo UEA perdis do pli ol 3000 asociajn membrojn (kaj 830 IM). Nombrojn de membroj de UEA dum la jardekoj vd. sub

https://eo.wikipedia.org/wiki/Membronombroj_de_UEA kaj <http://www.liberafolio.org/2016/12/16/la-membrokvanto-de-uea-draste-falegis> kaj de aliĝintoj al Universalaj Kongresoj vd. sub

https://eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Kongreso_de_Esperanto.

⁵ Vd. denove http://www.planlingvoj.ch/UEA_delegitoj_kaj_membroj.pdf.

⁶ En Pollando la Eo-movado praktikis ioman personan kulton ĉirkaŭ Bierut (sed poste rezignis pri troa politika propagando, en Bulgario ĉirkaŭ Dimitrov kaj Ĵivkov kaj en Jugoslavio ĉirkaŭ Tito (kiu estis, kiel intertempe vaste konate, ĉefrespondeca pri gravegaj krimoj kaj lezoj de homaj rajtoj dum la dua mondmilito kaj poste, sed tio ne malhelpis al la esperantistoj, kiuj verŝajne nenion sciis aŭ ne konsciis pri tiuj krimoj, kiuj estis tabuitaj en Jugoslavio, fanatike adoregi lin. Ankaŭ la e-istoj en Hungario kaj Ĉeĥoslovakio adaptis sin al la regantaj cirkonstancoj kaj obeis la politikajn premisojn. Ankaŭ la komunisma 'idolo' Fidel Castro (kiu nomis sin en 1990 „soldato de Esperanto“ kaj ŝajnis dorloti la Esperanto-movadon, sed poste perdis la intereson pri ĝi) estis admirata de la esperantistoj laŭ senkritika maniero kaj per blinda adorado, kvankam tiu komunisma reganto sisteme subpremadis la kuban popolon, kies homaj rajtoj estis grandskale lezataj kaj kie kritikistoj kaj opoziciuloj (al kiuj la e-istoj ja ne apartenis), kiuj estis ĵetitaj en la malliberejon, estas persekutataj de la KP ĝis nun. La Eo-movado komplete silentas kaj silentis ankaŭ en tiu ĉi kazo, same kiel en la kazoj de Ĉinio kaj Vjetnamio, kiuj estas respondecaj pri historie unikaj lezoj de la homaj rajtoj kun multaj milionoj da mortviktimoj, malliberuloj kaj persekutitoj kaj pri rigoraj subpremo kaj persekutado de ĉiuspeca opozicio aŭ politike sendependa agado en tiuj landoj.

(aŭ simile), kiuj grandskale subpremis la civilsociojn kaj lezis la homajn rajtojn.⁷ Se la Esperanto-movado, kiu en tiuj landoj cetere forlasis la politikan neŭtralecon, estintus honesta (homrajta) movado, ĝi estus devinta kritiki la politikon kaj eventuale eĉ aliĝi al la movado de la disidentoj kaj opoziciuloj aŭ almenaŭ en iu taŭga formo esprimi sian proteston kaj rezigni pri la favoro kaj profito de la politika sistemo.⁸ Nature, tio estas hodiaŭ pli facile direbla ol siatempe estis farebla, ĉar ĉiuj politike nekonformaj tendencoj estis senkompate subpremataj, kontraŭbatalataj kaj persekutataj de la komunismaj partioj. Sed finfine la esperantistoj, kiuj falis kun sia oportunisma sinteno en la politikan kaptilon, perdis la ludon. Sed ŝajnas, ke la esperantistoj tute ne havas malbonan konsciencon pro sia simpatio kun la komunismo, de kies krimoj ili neniam eksplicite distanciĝis. Tio simple ne koncernis ĝin. Ŝajnas, ke iuj esperantistoj eĉ bedaŭras, ke la komunismo pereis, ĉar en ĝi la Esperanto-movado evidente iom prosperis kaj povis ludi iun „socian“ rolon. Kiel konate, la historio de la marksismo-socialismo-komunismo estis historio de ekstrema perforto, sistemaj subpremado, cinika mensogado kaj praktika deformado de la aferoj, kaj de la homoj mem. La Esperanto-movado, kiu partoprenis kaj subtenis tiun sistemon, de kiu ĝi evidente povis profiti, aŭtomate kompromitiĝis kaj diskreditiĝis, kiam la komunismo kolapsis en tiuj landoj (kvankam neniu rekte aŭ oficiale diris tion). El nuntempa perspektivo eblas diri, ke la (rekta aŭ malrekta) subteno de tiu sistemo do estis kruda eraro kaj ke la Esperanto-movado staris sur la malĝusta flanko de la historio. De miloj aŭ dekmiloj da iamaj Esperanto-adeptoj en la orienteŭropaj landoj restis nur kelkcent membroj de Esperanto-organizaĵoj, kaj novaj membroj estas apenaŭ registreblaj.

Esperantistoj ĉiam trovas iun (dubindan) manieron por praviĝi. Hodiaŭ pri la mizero de Esperanto kulpas laŭdire globalizacio, neoliberalismo aŭ la nacia (ekzemple kroata) ŝovinismo, kiel oni povas aŭdi aŭ legi.

Cetere, la saman politikan eraron hodiaŭ ŝajnas ripeti la esperantistoj en Ruslando, se ili apogas la (duon/kriman) politikon de Putin.⁹ Krome, oni devas supozi, ke parto de la esperantistoj subtenas la novan „dekstran popolismon“, kiu ŝajnas anstataŭi la forfalintan maldekstrismon, kiu same ribelis kontraŭ la reganta politika elito kaj la burĝaj establoj kaj postulis novan mondordon, kiel siatempe la komunistoj faris tion.

4. Falo de la sav-ideologioj kaj krizo de la tradicia asocia vivo.

Intertempe okazis ne nur la falo de la komunismo, sed ankaŭ diversaj fundamentalismaj sav-ideologioj kaj tradiciaj religiaj movadoj troviĝas en grava ekzista krizo. Ankaŭ Esperanto apartenis/as al tiaj savideologioj, sur la kampo de la lingvistiko (kaj eble ankaŭ lingvopolitiko). Esperanto (aŭ la Esperanto-movado) estis/as ide-historie ne nur parenco de la marksismo-socialismo-komunismo, sed ĝi portis/as ankaŭ pseŭdo-religiajn trajtojn de sekto. Tradiciaj religioj (aŭ eklezioj), filozofioj kiel la marksismo-socialismo-leninismo (kun la komunisma partio kiel politika kaj socia gvidanto) kaj Esperanto (reprezentata de la Esperanto-movado, precipe de UEA) perdis ne nur amason da membroj, adeptoj kaj subtenantoj, sed grandparte ankaŭ la etikan kaj moralan kredindecon kaj iliaj movadoj estas pli malpli elĉerpitaj, ĉar iliaj ideologioj, filozofioj, teorioj kaj doktrinoj (aŭ instruoj) estis aŭ misformitaj (aŭ almenaŭ ne modernigitaj) de gvidantoj de tiuj movadoj, kiuj ĉefrespondece por la degenerado de tiuj movadoj, aŭ evidentiĝis trompaj, ĉarlatanaj, falsaj, mensogaj, finfine neutiligeblaj (kvankam daŭre ekzistas miloj aŭ milionoj da adeptoj, precipe de tradiciaj religioj kaj eklezioj kaj sennombraj religiaj sektoj ekster la oficialaj eklezioj).

Lige kun la krizo de tradiciaj ideologioj kaj movadoj en malbona stato troviĝas ankaŭ la tradiciaj asocioj. Tamen, oni ne povas paroli pri ĝenerala mortado de tiaj asocioj.¹⁰ Ankaŭ la Esperanto-movado probable pluekstas kiel – lingvistika – sekto, cetere kun preskaŭ nula signifo en la mondo, kompare kun aliaj movadoj.

⁷ En la germana lingvo enradikiĝis la nocio „Unrechtsstaat“ por tiu tipo de ŝtato aŭ jura sistemo.

⁸ Fakte en tiuj landoj ekzistis kelkaj e-istoj, kiuj kondukis iom opozicie kaj pro tio havis problemojn. Sed oni devas dubi, ke la Esperanto-movado havis pli da prestiĝo, se ĝi estus aliĝinta al la disidentoj kaj opozicio en tiuj landoj.

⁹ Vd. S. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_adacta_2015.pdf, ĉap. 10 (germanlingve).

¹⁰ Tamen ne ĉiuj: Se iuj organizaĵoj estas bezonataj por larĝa publiko, ili povas ĝoji pri granda intereso kaj multaj membroj. Ekzemple, la svisa aŭtorrajta asocio Pro Litteris (al kiu ankaŭ la aŭtoro apartenas), fine de 2015 havis dek mil membrojn, kaj ĉiujare aliĝas novaj membroj; en Germanio, al la Socialdemokratia Partio ĉiujare aliĝis dek tri mil novaj membroj, dum la sindikatoj perdis multegajn membrojn. Pri sportaj organizaĵoj, kiu havas milionojn da membroj, ni tute ne parolu.

5. Elmortado de la pioniraj generacioj kaj malaltnivela diskutkulturo.

La antaŭ- kaj postmilitaj pioniraj generacioj de Esperanto-movadoj – kiuj iom post iom forgesiĝis (krom kelkaj ‘eternaj korifeoj’) kaj kiel tuto bedaŭrinde ne estis sufiĉe aprezataj, honorataj kaj omaĝataj de la UEA-movado – elmortis aŭ estas elmortantaj. Ilia anstataŭigo per kvante kaj kvalite adekvataj novuloj estas malfacila kaj dume apenaŭ okazis (krom tio, multaj el ili same rapide malaperis kiel ili aperis, ekzemple en TEJO). La sekvo de tiu degenera procezo estas, ke la Esperanto-movado havas ĉiam malpli da resursoj je dispono, kiuj povus krei kaj produkti intelektajn, kulturajn kaj sciencajn valorojn kaj plusvalorojn por la lingvo Esperanto, ekzemple librojn aŭ aliajn interesajn publikaĵojn. Mankas novaj aŭtoroj, legantoj kaj diskutantoj. Mankas interesaj gazetoj. Novaj interesaj gazet-prjektoj ĉiam denove fiaskis pro manko de abonantoj, redaktoroj kaj verkantoj de artikoloj. Tiel, ne nur la aĉetpovo kaj konsumado, sed ankaŭ la intelekta nivelo falas en la movado. Pro manko de aktivaj ‘merkataj’ partoprenantoj la varoj, kiuj aperas en Esperanto, eĉ ne plu estas konsumataj, aĉetataj aŭ legataj. De jardekoj en la Eo-movado ĉio turniĝas ĉirkaŭ la samaj personoj kaj temoj, al kio apartenas eterna adorado de ĉiam samaj ‘ikonoj’ de la Eo-movado, kio favoras kulton de persono. Nur malofte aldoniĝas eksteraj novuloj, kiuj kontribuas aliajn vidpunktojn.

Tiu degenera procezo havas ankaŭ gravajn konsekvencojn por la diskutkulturo de la Esperanto-movado, kiu ĉefe okazas en la ‘sociaj forumoj’ de la interreto, ofte limiĝas al primitivaj, malintelligentaj kontribuajtoj de infanecaj homoj, kiuj ofte faras la impreson de kretenoj. La diskutoj en tiuj medioj havas malmultan signifon kaj aldonas nenion (plus)valoron, estas sen substanco kaj restas sen sekvoj. En kongresoj la diskutoj, kiujn partoprenas nur malmultaj homoj, restas supraĵaj, banalaj kaj malkompetentaj kaj karakteriziĝas per la fakto, ke la homoj ne kapablas aŭ kuraĝas starigi gravajn, tiklajn kaj intelligentajn demandojn. Ofte la Esperanto-komunikado ofte limiĝas al la primitiva interŝanĝo de simplaj frazoj, kaj kiam la konversacio aŭ diskuto fariĝas tro malfacila, la esperantistoj ŝanĝas al la nacia lingvo, ĉar al ili mankas necesaj vortoj de la praktika uzado. Malfacilajn temojn kaj tabuojn ekzemple pri la stato de la movado oni ne emas tuŝi, kaj la respondoj de ‘oficialaj’ movadaj funkciuloj estas deflankiĝemaj kaj ĉirkaŭemaj, palaj, formalaj, oportunismaj, neniondiraj, ne kompletaj kaj finfine malhonestaj kaj neutiligeblaj. Sub tiaj kondiĉoj ĉiuj provoj gvidi racian, kompetentan kaj fruktodonan diskuton kun esperantistoj, kiuj ĉiam nepre havas alian opinion pri ĉio ajn kaj ĉion pli bone scias, nepre fiaskas, tiel ke la intereso de la publiko malaperas.

6. La Esperanto-movado estis/as precipe propaganda movado.

La Esperanto-movado ne estis/as unuavice serioza lingv(istik)a movado – ĉe la plimultaj e-istoj temis/as esence pri radikalaj lingvistaj fundamentalistoj, kiuj malmulte aŭ eĉ nenion komprenis/as pri lingvoj, lingvaj demandoj kaj lingvistiko (krom eble se ili havis/as akademian kleracon aŭ profesie okupiĝis/as pri lingvoj kaj lingvistiko). La Esperanto-movado estis/as unuavice propaganda kaj aktiv(ul)isma, ‘popolisma’ movado, do ĉefe idea, sugesta aŭ eksperimenta movado, al kiu preskaŭ komplete mankis reala (aŭ praktika) efektiviĝo laŭ la prceloj. Temis/as pri movado, kiu dependis ĉefe de privataj iniciatoj kaj de la hazardo kaj kiu vivis/as preskaŭ nur de propagando, turismo kaj amuzo en la libertempo. Eĉ la klerigo fariĝis parto de la propagando. La aktivularon de la Esperanto-movado esence konsistigis/as amatoroj, hobiuloj, libervoluloj, diletantoj kaj diversspecaj stranguloj, kiuj diktis (kaj daŭre diktas) la tonon en la asocioj, kio kaŭzis, ke al ĝi grandparte mankis/as seriozeco, profesieco kaj alta nivelo. En la Esperanto-movado ofte homoj, kiuj fiaskis en la ‘normala’ vivo aŭ serĉis iun alternativon al ĝi, trovis iun gravan rolon aŭ ekzistorajton, kie ili povas vivi siajn (duonkonfuzajn) revojn, iluziojn kaj fantaziojn laŭ la moto ‘ju pli fanatike, eksternorme, malnormale, alternative kaj freneze, des pli bone’. La propagando de la Esperanto-movado, kiu post 1989 alprenis eĉ pli skurilajn formojn, elpuŝis gigantajn blufojn kaj produktis ĉefe varman aeron kaj nekredindajn asertojn, kiujn la esperantistoj sovaĝe disvastigis. La propagando de la Esperanto-movado havis tioman potencon, ke eĉ seriozaj politikistoj kaj sciencistoj lasis sin tenti de ĝi kaj blinde kredis kaj fidis la asertojn de la esperantistoj. Neniam oni kritike traktis tiun propagandon, pro kio en la publikeco (kaj scienco) preskaŭ plene mankis kritikaj konsideroj kaj analizoj. La Esperanto-movado posedis la monopolon pri la vero. Al tiuj blufoj apartenas, ke oni asertis, ke ekzistas milionoj da esperantistoj, kvankam en la koncernaj periodoj ekzistis eble maksimume nur kelkmil homoj, kiuj estis signifaj aktivuloj kaj samtempe realaj kaj bonaj Esperanto-parolantoj. Tiel, la tradicia propagando de la Esperanto-movado, kiu senlime troigis la faktojn, perdis

sian kredindecon. Multaj ĉiuspecaj kredaj fantazioj, ĥimeraj organizaĵoj, fikciaj titoloj rande de la kuriozeco,¹¹ lingvisma sektemo (ekzemple la obstina rifuzo enkonduki urĝe bezonatajn lingvajn neologismojn aŭ la emo radikale esperantigi ĉiujn nomojn), ideologia fanatiko, propaganda fanfaronado kaj misieca fervoro damaĝis kaj izolis la Esperanto- kaj planlingvan movadon kaj malhelpis, ke la lingvo (aŭ projekto) Esperanto estu ĝenerale agnoskita de la „ekstera mondo“.

Bombastaj propagandaj deklarioj kun skizofrenia karaktero kiel la „Praga Manifesto“ aŭ la „Strategia Plano de UEA“, kiuj ne estas pli ol fuŝaj kaj teoriaj ĥimeraj elpensajoj de realecfremdaj fantaziuloj kaj revuloj el la akademia eburturo, ne estis kaj ne estas utiligeblaj kaj aplikeblaj en la praktiko, kiel montris la sorto de tiuj fiaskintaj sensencaj kreaĵoj,¹² kiujn oni volis altrudi al la aktivuloj por efektiviĝi ilin, kompreneble sen sukceso. Voĉoj, kiuj postulis reformojn en UEA, estis sisteme malaŭdataj de ties estraro kaj komitato, kiuj estis malkapablaj kaj ne volis realigi ilin.

Dugrade Esperanto servis ankaŭ al la propagandado de plej diversaj aliaj movadoj, kiuj ŝajnis estis parencaj al la Esperanto-movado, ekzemple marksismo-socialismo-komunismo kaj diversaj religioj (precipe katolikismo, bahaismo, kvakerismo, islamo kaj budhismo), sed ankaŭ fluoj kiel ateismo, sennaciismo, vegetarismo, ekologio, biciklismo, fervojismo, turismo, samseksamo, naturismo, pacismo, spiritismo, etnismo, mondĉivitanismo, skoltismo, junulara (protest)movado, pedagogio, k.a. Kvankam oni asertis, ke tiuj fluoj fekunde influis unu la aliajn, simbioze kaj kurioze interkruciĝis ideoj de Esperanto kun ideoj de la menciitaj movadoj, kio kondukis unue al tro malforta diferencigo de tiuj ideoj, due al groteska intermiskiĝo, tordado, kaj nebuligo kaj trie al nova interpretado kaj kompreno (percepto) de la originaj ideoj zamenhofaj kaj esperantaj.

7. Fakte malmulte interesa kaj utila aperis/as en Esperanto.

Kompare kun grandaj kaj mezaj naciaj lingvoj, en la lingvo Esperanto ne estis produktita kaj publikigita multe vere interesa, utila aŭ moderna, kion la homaro povus reale utiligi aŭ kio ankoraŭ povus interesi la esperantistojn mem. Preskaŭ ĉio, kio aperis en Esperanto, estis kreita en la senco kaj spirito de la propagando, eĉ la beletra (por montri, ke Esperanto ekzistas kaj taŭgas ankaŭ por literaturaj celoj). Nek la originala verkado nek la traduka kreado en Esperanto estas kvante kaj kvalite mezurebla kun la verkado en la grandaj kaj mezaj nacilingvoj. Estis/as pli malpli ĉiam la samaj aŭtoroj, kiuj verkis/as librojn, tekstojn, recenzojn kaj komentojn laŭ samaj modeloj kaj vidpunktoj. Kun kelkaj raraj esceptoj, la intelekta nivelo de la literatura kaj publica produktado en Esperanto estas malalta. Neniam iu Esperanto-verkisti/in/o ricevis la nobelpremion por literaturo, kvankam la esperantistoj havis/as seriozajn ambiciojn por tio. La ŝanco ricevi ĝin do estis/as probable tre malgranda. Oni ja ne nepre devus celi la nobelpremion mem, sed povus havi iom pli modestajn ambiciojn kaj klopodi ekzemple por premio sur malpli alta nivelo. La stranga kredo, cirkulanta inter esperantistoj, ke ne necesas traduki nacilingvaj (fak)verkojn al Eo, ĉar oni povas legi ilin nacilingve, malhelpis la evoluon de fruktodona kaj altnivela literatura aktiveco sur tiu kampo. Komplete eksaj kaj tedaj estas informoj kiel tiu, ke en Esperanto aperis la Fabeloj de Andersen, Hamleto kaj la Revizoro de Gogol. Kie estas la Esperanto-tradukoj de verkoj de Coetzee, Jelinek, Pamuk, Herta Müller, Gordimer, Mahfuz, Stasiuk, Woinowitsch, Jeroŝejev, Kaminer, Mankell, Foer, Adorno, Celan, Handke, Lewitscharoff, NDiaye, Sloterdijk, Ĉosić, mi tute ne parolu pri Arno Geiger, Katharina Hacker, Julia Franck, Uwe Tellkamp, Melinda Nadj Abonji, Jojo Moyes, Carlos Ruiz Zafón, Nicholas Sparks, Natascha Wodin, Markus Werner, Jonas Lüscher, Zoe Jenny, Adolf Muschg, Jurga Ivanauskaitė, Leena Lehtolainen, Sofi Oksanen, aŭ Guillermo Sacomanno, Washington Cucurto, Fabián Casas, Félix Bruzzone, Alejandro López, Pedro Mairal, Alan Pauls el Argentino, por menciigi nur kelkajn reprezente por la centoj da modernaj aŭtoroj?¹³ Kaj ĉi tie temas nur pri kelkaj nomoj el la beletra branĉo, pri la faka kaj scienca literaturo oni tute ne parolu. Ĉar la Esperantomovado bedaŭrinde ne havas monon (kaj intereson) por subteni interesajn literaturajn projektojn kaj la

¹¹ Ekzemple „konsulo de la Esperanta Civito“, „doktoro de la Akademio de Sciencoj de San Marino“ aŭ „Esperanto-reĝo Parzival“, ktp.

¹² Miajn komentojn pri tiuj vd. sub http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf (piednoto 18) kaj <http://www.planlingvoj.ch/UEA-strategio.pdf>.

¹³ Do bone, ekzistis provoj traduki al Eo verkojn de Borges, Dürrenmatt, Enzensberger, Szymborska, Grass, Brecht k.a. Problemo certe estas la aŭtoraj rajtoj. Krom tio mankas serioza komerca merkato por tiaj libroj. Eble havus sencon esperantigi la librojn de la svisa teologo Hans Küng pri la problemoj en la romkatolika eklezio, kio eble interesus legantojn en Ĉinio, Japanio, Koreio, Vjetnamio kaj Ruslando, kiuj ne konas la germanan lingvon sed nur Esperanton.

Esperanto-libromerkato estas malforta,¹⁴ ne estas mirinde, ke nur malmultaj aktivuloj pretas dediĉi sian tempon hodie kaj honorofice al verkado, kaj nur kelkaj Eo-aŭtoroj gajnas monon per literatura verkado.

8. La interlingvistiko servis/as unuavice al la Esperanto-propagando.

La „interlingvistiko“, pri kiu okupiĝis ĉefe esperantistoj, servis unuavice kiel pseŭdo-sciencia propaganda ‘armilo’ de la planlingva kaj Esperanto-movado, pro kio ĝi ne estis agnoskita de la scienco. Intertempe, multaj interlingvistoj kaj esperantologoj aŭ forpasis aŭ ne plu okupiĝas pri la afero, tiel ke la fako praktike orfiĝis. Nova generacio de interlingvistoj, kiu povus egalvalore anstataŭi la ‘klasikan’ generacion, ne aperis, kaj reviviĝon de la fako per novaj interesaj kaj utilaj aliroj kaj aŭtoroj, kiuj estus necesaj por ĝiaj kredindeco kaj postvivado, oni ne povas observi. Pri interlingvistikaj temoj el esperantista vidpunkto en principo ĉio estas dirita. Pro tio oni povas konsideri la diskuton pri tiu ĉi temaro kaj la fakon mem praktike elĉerpitaj kaj finitaj, des pli ke la fako ne sukcesis establiĝi. Provo de reinterpretado kaj remaĉado de malnovaj teorioj de Esperanto kaj Zamenhof fare de iuj kuriozaj novuloj aŭ malnovaj reprezentantoj de la fako havas neniun sencon, inter alie ĉar la demandoj, kiujn oni devus starigi kaj trakti, oni ne starigas nek traktas. Ĉefa tasko de la junaj interlingvistoj devus konsisti en tio, reĝustigi malnovajn mitojn, legendojn kaj duonverojn (kiujn la esperantistoj senkritike kredas kaj ripetas ĝis nun)¹⁵ kaj verki la historion de la planlingva kaj Esperanto-movado laŭ la normoj de la universala scienco (sed kion fari, se iuj e-istoj montras parte malamikan sintenon al la scienco?), ĉar tiaj studoj krude mankas (kaj en Esperanto kaj en la naciaj lingvoj). Sed kun bedaŭro oni devas konstati, ke en Esperanto-medioj la deziro, intereso, konscio kaj kapablo por tiaj streboj estas tro malgrandaj kaj malfortaj, aŭ entute ne ekzistas.

9. Nur la Esperanto-movado parolis/as pri sukcesoj, kvankam ĝi pli kaj pli fariĝis ĥimero.

Fakte nur la Esperanto-movado parolis pri „grandaj progresoj kaj sukcesoj“ de la lingvo Esperanto, dum la „ekstera mondo“, por kiu la Eo-movado restis nealirebla kaj fremda, praktike ne vidis/as kaj ne konis/as tiujn sukcesojn kaj progresojn, ĉar ili ne estis/as videblaj ĉe la „ekstera publiko“, kiu forgesis Esperanton kaj la esperantistojn. Per tio Esperanto, kies signifo estis senlime troigita kaj supertaksata de la propraj adeptoj, mem fariĝis ĥimero. Por multaj esperantistoj mem, kiuj parte verŝajne eĉ ne plu serioze konsideras sian projekton, Esperanto signifas nuran ege amuzan gagon de la distrosocio, kiun oni povas utiligi kiel instrumenton kaj ludilon por diversaj kuriozaj kaj dubindaj celoj. La Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiujn oni fakte ne plu povas nomi „grandaj sukcesoj“, fariĝis parto de iom kurioza eventkult(ur)o sen granda substanco, kie ĉiuspecaj fanfaronuloj kaj ĉarlatanoj ceremonias siajn personajn kulminojn por konvinki la (eble iom konfuzitajn) vizitantojn pri siaj opinioj kaj ideoj.

10. Esperantistoj ne estis/as interesataj pri historio kaj la „ekstera mondo“ kaj estas tro fokusataj al oficialaj komunikoj.

La provoj trakti la historion de la Esperanto-movado en la kunteksto de la historio de la „ekstera mondo“, fiaskadis, unue ĉar la esperantistoj ne interesiĝis/as pri (tiu) historio kaj due ĉar la Esperanto-movado agis/as ekster ĝia kadro. Esperantistoj okupiĝas en principo nur pri Esperanto kaj ne interesiĝas pri aliaj temoj, se ili ne estas en rilato kun Esperanto.

Lige kun tio oni povas konstati, ke la Esperanto-movadon interesas en principo nur tio, kion diras kaj skribas oficialaj reprezentantoj de ŝtatoj kaj de ŝtat-proksimaj internaciaj organizaĵoj, kiel ekzemple Unesko, al kiu UEA flegas rilatojn de hipokritado kaj plaĉado kaj kies oficialajn komunikojn de ĉefaj funkciuloj ĝi regule reproduktis, dum la opiniojn de la civila socio oni ignoris.¹⁶ Tio estas kontraŭdiro en si mem, ĉar estas konate, ke multaj esperantistoj reprezentas profunde reakcian kaj malfidan sintenon

¹⁴ Kiujn librojn la esperantistoj aĉetis en 2016 vd. sub <http://revuoesperanto.org/node/7>.

¹⁵ Taŭĝan komencon faris ĉi-rilate Ziko Marcus Sikosek per sia libro „Esperanto sen mitoj“ (1999, 2003).

¹⁶ Ekzemple de Irina Bokova, ĝenerala direktorino de Unesko, kiu estis grava funkciulino de la komunisma aparato de Bulgario. Ankaŭ Amadou-Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko inter 1974 kaj 1987, kiu estis granda malamiko de la Okcidento, estis konsiderata de la esperantistoj kiel amiko de Esperanto. Aliflanke, UEA neniam reproduktis la komunikojn de Amnestio Internacia aŭ de Human Rights Watch.

rilate al oficiala politiko, al ŝtatoj kaj registaroj. Tiu sinteno do ne nur respegulas profundan hipokritecon, sed ĝi estas ankaŭ erara. Anstataŭ inviti gravajn personecojn de la civilsocio, oni invitas (sensignifajn) diplomatojn ekzemple al kongresoj, kvankam oni intertempe scias, ke tio havas malgrandan sencon (des pli ke tiajn invitojn akceptas ĉiam pli malmultaj diplomatoj).

Alia problemo estas, ke la esperantistoj komplete neglektas kaj ignoras nacilingvajn literaturajn fontojn, tiel ke eksteraj influoj tute ne povis/as enpenetri la movadon. Refreŝiĝo en Esperanto ne povis/as okazi, ĉar daŭre okazas gurda referencado al malnovaj 'klasikaj' verkoj, kiuj estis produktitaj de esperantistoj mem, kio helpis/as reprodukti la malnovajn mitojn kaj legendojn.

11. La Esperanto-movado estis/as multe tro okupata pri si mem.

La Esperanto-movado, kiu ĉiam estis okupata antaŭ ĉio pri si mem, neniam serioze interesiĝis pri la kunlaboro kun aliaj Neregistaraj Organizaĵoj, kaj inverse, por entrepreni komunajn agadojn aŭ projektojn, ĉar la esperantistoj timis konkurentojn kiel la diablo timis la benitan akvon. La Esperanto-movado, kiu volis mem „plibonigi la mondon” aŭ eĉ „savi la homaron”, restis socie kaj politike izolita, ĉar ĝi ne interesiĝis pri la aferoj de la „ekstera mondo” (kiu ne volis adopti Esperanton, pro kio la esperantistoj estis seniluziigitaj kaj ĉagrenitaj). Do, necesus ŝanĝi la „kulturon” de la Esperanto-movado, por ke la Esperanto-movado transformiĝu de fermita al malfermita movado. La Esperanto-movado ne nur ne kapablis kunlabori kun aliaj NROj, sed la ekstrema individuismo de la Eo-aktivuloj malhelpis ankaŭ la fruktodonan kunlaboron ene de la movado mem.

12. La mondo ne (plu) estas interesata pri la disvastigo aŭ enkonduko de Esperanto.

Malgraŭ portempa unuopa apogo kaj simpatio flanke de iuj politikistoj (plej ofte el la maldekstra tendaro), la monda politiko fakte ne (plu) estis/as interesata pri vastskala disvastigo aŭ enkonduko de internacia neŭtrala planlingvo kiel Esperanto en la ŝtatajn lernejojn. Neniu ŝtato agnoskis Esperanton oficiala lingvo kaj la internaciaj organizaĵoj ne ripetis rezoluciojn favore al Esperanto. La argumentoj de la esperantistoj pri la „altaj noblaj idealoj” de la paco, interfratiĝo inter homoj kaj popoloj, interpopola solidareco, plibonigo de la mondo, k.s. kaj pri la „plej facila lingvo de la mondo” ktp. ne plu funkciis/as. Povas esti, ke i.a. la kritikaj, misfamigaj kaj denuncaj artikoloj kontraŭ kaj negativaj, stultaj aŭ neobjektivaj komentoj pri Esperanto en la gazetaro fare de malamikoj de Esperanto aŭ de homoj, kiuj estis malbone informitaj pri ĝi,¹⁷ ludis iun rolon malfavore al ĝi. Sed la homaro, kiu ĝenerale ne sciis, kio estas Esperanto, rilatis indiferece al ĝi. Ĉefa kialo de la rezigno pri tia lingvo estis verŝajne la konvinko (kiu samtempe estis antaŭjuĝo), ke la homaro ne bezonas „arteficialan” lingvon kaj ignoris la ideon. Tiel, la argumentoj por defendi tian lingvon en principo ne efikis.

13. La internaciaj organizaĵoj rezignis pri la planlingva diskuto.

La konkurenc-lukto inter internaciaj neŭtralaj planlingvoj (kvankam Esperanto 'gajnis' ĝin), kiu ludis certan rolon ĉe mondaj instancoj, kiuj devintus decidi pri la adopto de la plej taŭga planlingvo kaj kiuj ne estis certaj, kiun version de tia planlingvo oni elektu (pro kio ili decidis prokrasti tiun demandon, kiu jam de longe ne plu aktualas, al laiksa tago), ludas neniun rolon plu kaj eble eĉ kondukis al plena rezigno pri la konsiderado de internacia arteficiala neŭtrala planlingvo por la internacia komunikado.

¹⁷ Atentinda kazo de tiu speco estas jena intervjuo (de 2012): <http://conversations.e-flux.com/t/the-power-of-bilingualism-interview-with-barbara-cassin-french-philosopher-and-philologist/6252>, en kiu la demandita aŭtorino diris, ke „Esperanto is a pure artefact and not a language” kaj neis, ke en Esperanto ekzistas verkistoj aŭ verkoj. La rifuzo de ĉiu speco de „koinco”, „lingua franca” kaj „Esperanto” estas probable klarigebla el la sinteno de tiu lingvofilozofino, kiu rifuzas ankaŭ la „globalan anglan”, nomatan „Globish”, kiel „nerealan lingvon”, en kiu „ne ekzistas verko krom pri la utiligo por financaĵoj de Bruselo”. Tiaj lingvoj estus „nur lingvoj de la servoj kaj ne plu de la kulturo”. Tiu argumento estas interesa. Tamen, la problemo de tiaj lingvistoj estas, ke al ili komplete mankas ne nur la praktika kono de Esperanto, sed verŝajne ankaŭ la baza (teoria) kompreno de la ideoj de Esperanto kaj de internacia neŭtrala planlingvo entute.

14. La Esperanto-movado sisteme ignoris kaj obstine rifuzis kritikon de interne kaj ekstere.

La Esperanto-movado sisteme ignoris kritikon de interne kaj ekstere kaj kaj obstine rifuzadis ĝin. Tiel, La Esperanto-movado fariĝis kvazaŭ imuna kontraŭ ĉia speco de kritiko. Ĉiu kritiko estis konsiderata kvazaŭ kiel perfido de la afero aŭ perceptata kiel persona ofendo kaj kalumnio. Tio malhelpis korektadon de eraroj kaj eraraj evoluoj kaj evitadon de fuŝoj kaj sensencaĵoj kaj favoris kuriozecon, sektemon, praviĝemon, oportunismon, reciprokajn flatadon, naivan laŭdadon kaj komplezan gratuladon en la movado kaj samtempe ebligis pugolekadon ĉe certaj politikistoj. De jardekoj UEA estas gvidata kaj kontrolata de la samaj klikoj aŭ koterioj, kiuj sidas (parte samtempe) en ĉiuj eblaj estraroj, komitatoj kaj komisionoj kaj kies ekstrema konservativismo kaj rifuzemo de kritiko¹⁸ evitis ĉiajn ŝanĝojn, dum ŝajne pravaj principoj, pozicioj kaj la 'ĝusta interpretado' de la historio estis defendata kiel sanktaj bovinoj, dum pli kritikemaj, sendepende pensantaj esperantistoj kaj nekonformaj kaj nekonvenaj aŭtoroj estis traktataj kiel „fipersonoj“, „malpurigantoj de la nesto“¹⁹ aŭ „malamikoj de Esperanto“, kies verkojn oni prefere ne menciia (eĉ en sciencaj bibliografioj kaj literatur-listoj pri interlingvistiko). En Eo-revuoj la nomoj de tiaj kritikistoj estis/as totale prisilenti/i/ataj kaj asociaj funkciuloj kutime evitis/as rilaton kun ili. Plej multe kritikon maltoleris tiuj, kiuj plej laŭte postulas toleri aliajn opiniojn kaj vidpunktojn kaj riproĉas al kritikantoj, ke ili *ne kapablas kunlabori*. Forta tabako! (La vero estas, ke ĝuste tiuj homoj kutime mem ne kapablas kunlabori kun aliaj. Sed tia sinteno estas tipa por ĉiu sistemo aŭ movado kaj por ĉiu ideologio, kiu defendas la pretendon pri la vero. En tiu rilato la Esperanto-movado pli similas al totalismaj kaj aŭtoritatecaj sistemoj (kun grandaj kaj malgrandaj „gvidantoj“ kaj „senlimaj admirantoj“) ol al aŭtentikaj demokratiaj kutimoj. Tiu konservativismo, tiu maltoleremo kaj la 'mainstream' kaŭzis, ke freŝaj ideoj ne povis influi kaj fekundigi la movadon kaj ke la progreso estis malhelpata.

15. La malamo de la esperantistoj kontraŭ la angla lingvo havis/as pure ideologiajn motivojn.

La 'venko' de la angla lingvo kaj la aplikado de la nacilingva (multlingva) koncepto, kiu rekte kontrastas kun la imago pri unusola (paralele uzata) neŭtrala arteficiala internacia lingvo „kiel dua lingvo por ĉiuj“, faris la Esperantan koncepton superflua kaj plene forpuŝis la ideon enkonduki tian lingvon. Malgraŭ globalizacio kaj malfermo de limoj, pluekzistas naciŝtataj kaj nacilingvaj ambicioj, kiuj obstine kaj ĵaluze vartas pri sia nacia suvereneco kaj ne estas interesataj adopti „sennacian“ lingvon kiel Esperanto. La angla lingvo ne estis trudita al la homaro, kiel la esperantistoj asertas, sed nature disvastiĝis en la mondo de jarcentoj (certe ne sen la subteno de anglalingvaj landoj). Milionoj kaj miliardoj da homoj parolas aŭ lernas tiun lingvon en principo *libervole*,²⁰ ĉar ĝi montriĝis kaj pruviĝis la sola taŭga internacia lingvo, sendepende de la demando, ĉu oni ŝatas ĝin aŭ ne, ĉu ĝi estas facile lernebla aŭ ne, ĉu ĝia origina patrujo estas Anglio aŭ Usono (la angla lingvo jam delonge emancipiĝis de siaj angla kaj usona patrujoj, memstariĝante kiel idioma en tuta aro da ŝtatoj, en kiuj la angla lingvo ne estas perceptata aŭ eĉ kondamnata kiel rimedo de la „usona kultur-imperiismo“). Tiel, la angla fariĝis *ĉies* kaj *nenies* lingvo. La kritiko de la angla lingvo fare de la esperantistoj estas subjektiva, pure ideologia kaj fontas en malnovaj kaj eksmodaj teorioj, stereotipoj kaj antaŭjuĝoj el la tempo de la koloniismo, kontraŭ-imperiismo kaj komunismo, kiuj jam de longe perdis siajn aktualecon, validecon kaj kredindecon. La e-istoj malŝatas la anglan lingvon, ĉar ili malŝatas la anglalingvan mondon, precipe Usonon, ĉar laŭ ili ĝi estas ligita kun kultura imperiismo, kapitalismo, novliberalismo kaj kontraŭ-komunismo. Dubinda estas ankaŭ la aserto de la esperantistoj, ke la angla lingvo rekte kulpas pri la lingvocado, t.e. pri la forpuŝado aŭ elmortado de aliaj lingvoj. La vero estas, ke la elmortado de certaj lingvoj (kaj triboj), precipe ekster la origine anglalingva mondo, havis tute aliajn kaŭzojn, en kiu la angla lingvo ludis neniun rolon. Samtempe, la esperantistoj nete prisilentis aliajn drastajn kazojn de lingvocado (ekzemple la kazon de Ruslando, kie la ŝovinisma rusa kaj sovetia lingvopolitiko forpuŝis preskaŭ ĉiujn indiĝenajn minoritatajn

¹⁸ Kiel tipan ekzemplon por tiu sinteno oni povas aldoni la recenzon de M. Fettes pri libro de Z. Galor kaj J. Pietiläinen kun kritika analizo de la UEA-movado, kiu aperis en *Esperanto* (UEA), dec. 2015, p. 257.

¹⁹ Tiel D. Blanke al la aŭtoro en Vilno 2005. Ĉi tiu elstara e-isto kaj interlingvisto, kiu kiel speco de „granda inkvizitoro“ de la orienteŭropa Eo-movado kontrolis la Eo-movadon de GDR kaj en la nomo de SED kaj de la Kulturligo de GDR limigis la liberecojn de ĝiaj membroj, kaj kiu ankaŭ en sia GIL, kiun li fondis post la politika turniĝo, rigore subpremis, evitis kaj cenzuris ĉiujn malagrablajn kaj tiklajn temojn, estis honora membro de UEA.

²⁰ En Duolingo laŭdire 50 milionoj hispanlingvanoj lernas la anglan lingvon (vd. <https://www.youtube.com/watch?v=WSyiKwBCoJ4>).

etnajn idiomajn per la rusa lingvo, kiuj komencis degeneri.²¹ Krom tio, oni povas konstati, ke en ĉiuj landoj de la mondo la popoloj daŭre utiligas siajn proprajn etnolingvojn kaj ne la anglan por komunikadi sur nacia kaj loka niveloj. Krom tio necesas agnoski la elstaregan signifon de la angla lingvo kiel internacia lingvo de la ekonomio; sur tiu ĉi kampo Esperanto havas nenian signifon kaj ludas nenian rolon kaj do ĉiukaze neniel povas konkurenci kun la angla lingvo. Due, multaj e-istoj konsideras la anglan lingvon konkurento aŭ rivalo de Esperanto kaj opinias, ke Esperanto estas en principo (morale) supera al la angla, kvankam Esperanto tamen probable neniam forpuŝos aŭ anstataŭos la anglan lingvon.²² Do, la sinteno de la esperantistoj, kiuj mistaksas kaj ne vere konas la lingvajn realaĵojn en la mondo, rilate la anglan lingvon ne estas nur subjektiva kaj pure ideologieca, sed ankaŭ paranoja-konspirema, malsincera kaj malhonesta, dum la propraj ambicioj de la esperantistoj devas esti konsiderataj kiel skizofreniaj.

16. Esperanto ne sufiĉe taŭgas kaj utilas kiel internacia lingvo.

(Bedaŭrinde) evidentiĝis, ke objektive vidate Esperanto ne sufiĉe taŭgas kaj utilas kiel internacia lingvo, ĉar ĝia lingva karaktero ne estas sufiĉe internacia, sed precipe hindeŭropa-romanida (malgraŭ aglutinaj kaj izolaj elementoj, kiuj estas karakterizaj por neeŭropaj lingvoj). Alia paradokso estas, ke Esperanto evidentiĝis tro malfacile lernebla por certaj homgrupoj (ekz. lingve netalementaj homoj, afrikanoj kaj azianoj, sed ankaŭ francoj kaj angloj/usonanoj, kiuj havas problemon prononci Esperanton), pro kio ĝi restis koncentrita al (orienta) Eŭropo, kie ĝi estis relative sukcesa, dum en aliaj kontinentoj nur kompare malmultaj homoj lernis Esperanton. Malgraŭ ĉia (prava kaj malprava) kritiko kontraŭ ĝi, Esperanto tamen estas reale funkcia (kaj tre interesa) lingvo, sed la esperantistoj tro malmulte utiligis ĝian potencialon. Kvankam Esperanto estas evidente pli facile lernebla kompare kun diversaj nacilingvoj, la praktiko montris, ke spite al tiu avantaĝo multaj esperantistoj malbone regas ĝin.²³ Multaj lernintoj restis „eternaj komencantoj“ kaj aliaj forlasis Eon post kelktempa lernado kaj perdis la intereson pri ĝi. Alia problemo de Eo estas, ke por profesiaj kaj ekonomiaj celoj ĝi estis apenaŭ aplikata. Do, ĝi restis ĉefe hobio. Ĉu Esperanto estas „nobla“, „humanisma“, „demokratia“ aŭ „propedeŭtike valora“ lingvo, kiel la e-istoj emfazas ĝiajn (ideologiajn) valorojn, el pragmatisma vidpunkto tia argumentaro ne estas decida por la sukceso de iu lingvo. La sukcesa lernado de ajna lingvo, eĉ plej malfacila, dependas unuavice de la motivacio kaj de la individua talento de la lernanto, sed ankaŭ de la praktika utiligeblo de iu lingvo kaj de la neceso lerni certan lingvon.²⁴

17. Sen la judeco de Zamenhof Esperanto verŝajne eĉ ne ekzistus.

Pri Zamenhof, kiun oni traktis kiel kvazaŭ-mesion aŭ duondion kaj aperigis hagiografiojn, oni sisteme mensogis kaj prisilentis aŭ neglektis gravajn faktojn de lia biografio, precipe lian judecon. Zamenhof, ĉe kiu oni, t.e. e-istoj kaj poloj, klopodis fari el judo polon, havis nenian komunecon kun la poleco, kiun li eĉ eksplicite neis (en Krakovo 1913). La sinteno de la UEA-movado (al kiu apartenas ankaŭ la pola Eo-movado, kiu evitadis emfazi la judecon de Zamenhof en sia propagando) pri Zamenhof estis baze

²¹ En la iamaj sovetiaj respublikoj, kie la rusa lingvo ludis tian hegemonian rolon, la naciaj lingvoj devis esti vere revivigitaj post la ŝtata sendependeco kaj povis esti savitaj, ĉar ili estis minacataj de degenero kaj malapero.

²² Kiel la angla lingvo kreas novan mondordon vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Fischer_Lingvoj_21jc.pdf.

²³ Fakte, granda parto de e-istoj neniam vere liberiĝis de nacilingvaj influoj (ne nur fonetikaj). 'Neŭtralan' elparolon kaj glatan bonan parolstilon disponas nur relative malmultaj (kleraj) e-istoj, dum la plimulto prononcas kaj parolas ĝin fuŝe. (Pri la problemoj de la Eo-gramatiko por lernantoj vd. http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf (piednoto 12).

²⁴ Pri la demando de la lernmotivacio vd. http://www.planlingvoj.ch/vanParijs_lingvajusteco.pdf. Se ekzemple romao, vivanta en Ohrido en Jugoslavio, volis esti sukcese integrita en la socio, li scipovis *memkompreneble kaj tute nature* almenaŭ kvin lingvojn: krom la romaa kiel gepatra lingvo la makedonan, albanan, turkan kaj serbkroatan (kiel montris la ekzemplo de la esperantisto Usni Zemoski). Ankaŭ en najbara Prizren ĉiu (pli malpli klera) Kosovo-albano scipovis tiujn lingvojn. Eŭropanoj, kiuj volas sukcese kunlabori kaj komerci kun ĉinoj, japanoj kaj koreoj, lernas iliajn lingvojn (kvankam tio ŝajnas esti malfacila tasko). En Uzbekio la homoj oficiale lernas ekzemple la karakalpakian kiel lokan lingvon, la uzbekan kiel nacian lingvon kaj la anglan kiel internacian lingvon, dum la rusa lingvo servas al ili kiel regiona komerca kaj trafika lingvo. En Svislando migrantoj (gastlaboristoj) kaj rifuĝintoj el ĉiuj plej eblaj landoj lernas la svisalemanan lingvon (kaj nepre la lokan version) por altiĝi siajn ŝancojn por integriĝi. Ktp. Tio estas vivanta kaj pragmatisma, senideologia lingvopolitiko, kiu igas homojn, kiuj staras sub certa premo de la komunikado, libervole lerni ajnajn lingvojn. Dum al Esperanto komplete mankas ĝia utiligo sur tiuj terenoj.

malhonesta, kaj ĝi restis malhonesta ĝis nun.²⁵ En certaj marksismaj medioj (al kiuj apartenis ankaŭ kontraŭ-cionismaj kaj kontraŭ-israelaj tendencoj kaj kiuj havis fortan influon en UEA) oni eĉ klopodis komplete ekskludi la jude influitajn homaranismajn ideojn de Zamenhof, kiujn certaj (ateismaj) interlingvistoj (ekz. Drezen, Blanke) kondamnis kiel „judan mistikon“, kvankam, kiel intertempe ĝenerale konate, la judeco kaj la homoranismo estis esencaj elementoj en la pensado de Zamenhof. Oni povas starigi la hipotezon, *ke sen la judeco de Zamenhof Esperanto verŝajne eĉ ne ekzistus*. Sed ankaŭ en kristanaj medioj oni ne tro emis emfazi la judecon de Zamenhof (ĉar almenaŭ ĝis post la dua mondmilito en Eŭropo furoris sovaĝa kontraŭ-judismo kaj antisemitismo, pri kiu la popoloj de Eŭropo komencis rezigni verdire nur post la Dua Vatikana Koncilio kaj kun la politika, jura kaj morala prilaborado de la holokaŭsto en Germanio). Per aliaj vortoj: la *judo* Zamenhof evidente estis problemo por la Esperanto-movado, kiu agis en esence ateisma, marksisma kaj antisemitisma historia makroĉirkaŭaĵo. Al tiu ĉapitro de la historio cetera apartenas, ke la Eo-movado neniam esprimis ian kompaton aŭ bedaŭron pri la pereco de ses milionoj da judoj dum la ŝoao (i.a. en la pola gazetaro la temo fariĝis tabua). Ŝajnas, ke nun estas tro malfrue voli rehabiliti lin kiel judon, ĉar tia provo ĉiukaze ne estus tre kredinda kaj apenaŭ sincera, do, ĉiu ĉi-rilata provo devus esti pritaksita kiel vana klopodo. La plej lasta okazo kvazaŭ oficiale kaj digne rehabiliti Zamenhofon kiel judon estis maltrafita en 2009,²⁶ kaj plej verŝajne ĝi estos maltrafita ankaŭ en 2017. La krizo de la movado manifestiĝas ankaŭ en tio, ke en la „Zamenhof-jaro 2017“ estas anoncigitaj nur malmultaj memorkunvenoj, ke honora patrona komitato entute mankas kaj ke la esperantistoj mem apenaŭ plu interesiĝas pri tiu „jubileo“ kaj pri Zamenhof mem.

La 7an de aprilo 2017 la pola Sejmo omaĝis per aklamita akcepto de ĉi-koncerna decido la 100an datrevenon de la morto de L.L. Zamenhof. En la ĉi-koncerna teksto estas okulfrape, ke la judeco de Zamenhof ne estas menciita. La Esperanto-movado (antaŭ ĉio la pola) probable sentos sin konfirmita, fortigita kaj kuraĝigita ankaŭ en estonto rezigni pri la mencio aŭ emfazo de la judeco de Zamenhof, kiel finfine faris ĝin la pola Sejmo, kiu estas la plej alta reprezenta politika instanco de la lando.²⁷

Laŭ tiu maniero, la judeco de Zamenhof verŝajne ankaŭ plue estos ekskludita.²⁸

18. La Esperanto-„kulturo“ estas nur malkara imitaĵo de la naciaj kulturoj.

La Esperanto-movado ne sukcesis evoluigi „sennacian“, „transnacian“ aŭ „supernacian“ kulturon, ĉar ankaŭ kiel esperantisto germano restis germano, franco restis franco, ruso restis ruso, polo restis polo, kataluno restis kataluno, kroato restis kroato, ktp. ktp. Kelkaj eĉ montriĝis veraj naciistoj (aŭ almenaŭ patriotoj). La esperantistoj ne aŭ nur supraĵe emancipiĝis de sia etno aŭ nacio (malpli naciismaj eble estis afrikanoj, por kiuj ne la nacieco sed la tribo estas esenca) kaj apenaŭ konis la lingvon kaj kulturon de aliaj.

